




Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvaloriĝo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, treege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproporcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	Fr.	7,50	broŝ.
Ano kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,—	»
La Du Amatinoj — de Musset		7,50	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,—	»
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,—	»
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl		3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,—	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,—	»
Schidlof Zakwoordenboek		30,—	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)		10,—	»
Flageto por biciklo		6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,—	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 f.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Redakcia-adreso:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.

Atentu !

Grava Komunikado !

Notu bone !

Ekde la 1a. de Novembro la redakcio de "Flandra Esperantisto" estos plenumata de "Flandrema Grupo Esperantista" sub la gvidado de S.ro C. Schroeyers.

Depost nun la adreso de la redakcio estas: C. Schroeyers, Transvaalstraat No 10, Berchem-Antw. Ĉiujn artikolojn, komunikojn, korespondadon, rezen-cotajn librojn, intersanĝnumerojn, oni sendu estonte al la suprenomita adreso.

Por mankantaj aŭ nericevitaj numeroj kaj ankaŭ por adressanĝoj la adreso restos: H.v.d. Mast, Tweelingstraat No 6 Antwerpen.

La Redakcio.

Adiaŭo

Karaj Gelegantoj,

La plejmulto el vi sendube scias en kiaj cirkonstancoj ni prenis sur nin la redakcion de FL. ESP. Aŭ, pli bone dirite, kiel la sorto ŝetis tiun ŝarĝon sur niajn ŝultrojn. Apenaŭ estante la « helpanto » de nia bedaŭrata amiko Karnas, ni jam estis devigataj prizorgi la tutan redaktadon, pro lia plimalboniĝanta sanstato.

Tuj post la morto de Juul, ni jam petis esti anstataŭataj, sed vane. Ni daŭrigis plenumi tion, kion ni konsideris nian devon. Preskaŭ unu jaron ni faris tion. Sed ... en la lastaj monatoj la redakcia laboro ankaŭ por ni fariĝis tro laciga.

Nia profesia laboro postulas ĉiutagan streĉadon de niaj cerboj kaj nervoj, tiel ke ni bezonas vespere plenan ripozon aŭ almenaŭ malstreĉadon. Kaj tion ni ne trovas, se ni tri semajnojn de ĉiu monato vivas, ĉiam timante, ke nia kara organo ne aperos ĝustatempe kaj kun interesiga enhavo.

Tial ni eligis dum la Ligkunveno nian alarmkrion. Kaj feliĉe, la « Flandrema Grupo » parolis la liberigan vorton.

Ni jam transdonis nian redaktorecon ... sed tamen ... tute ne kun plezuro ! Ho, se ni ne bezonus labori por nia ĉiutaga pano ... se ni disponus pri tempo kaj ... mono, tiam certe ni estus daŭrigantaj nian laboron !

Sufiĉe ! Ni konsideru la realecon. La nomo de nia anstataŭanto garantias seriozan zorgon por nia revuo. Ni konvinkigas ke tiu-ĉi ŝanĝo estos pliboniĝo ! Kaj ni insiste invitas ĉiujn membrojn de F. L. E. subteni kaj helpi lin.

Antaŭ ol fini ĉi-tiun artikolon, ni sincere dankas S.ron H. Van Durme, la redakci-sekretarion, kiu, precipe en la komenco de nia redaktoreco, helpis nin laŭpove. Ni ne forgesu niajn konstantajn kaj de tempo-al-tempo-kunlaborantojn. Ni ankaŭ ne forgesu niajn « teknikajn » kunlaborantinojn, nome S.ino Joosten kaj F.ino Youkes, kiuj kiel maŝinskribistinoj, eĉ la plej aĉan skribaĉon faris legebla por la kompostisto.

« Adiaŭo » ni skribis supre de ĉi-tiu artikolo. Sed tio ne signifas por eterne. Se la nova redakcio tion ŝatas, ni restos konstanta kunlaboranto. Por « malstreĉi » niajn fortojn ni verkos ĉiumonate aŭ ĉiudumonate artikolon.

Do : Gis revido !

A. LODEMA.

Korespondado

S.ro L. C. Aalst. La Redakcio de « D.S.A. » malpermesis la represon de la tradukita de vi artikolo, ĉar ĝi pagis verkist-honorarion al la verkinto. — Red.

Flandra Ligo Esperantista

*Raporto pri la ĝenerala kunveno okazinta en Antverpeno,
la 22-an de Septembro 1935.*

La kunveno komenciĝas je la 10 1/2 horo, sub prezido de S.ro Rainson, vic-prezidanto.

S.ro Rainson malfermas la kunsidon per punkto ne sin trovanta sur la tagordo, nome la neatendita ekziĝo de la prezidanto de F. L. E. ; pro novaj okupoj S.ro Calloens ne plu povos okupi sin pri la esperanto-movado kaj rezignas je siaj funkcioj ; la estraro treege bedaŭras la foriron de S.ro Calloens kaj prezentas la plej sincerajn dankojn de la Ligo por lia energia gvido kaj senlaca laboro.

La Komitato de la monumento al S.ano Juul Karnas, dankas la multajn samideanojn kiuj malavare kontribuis al starigo de la memorŝtono.

La kunveno aprobas senrimarke la raporton de la antaŭa kunveno.

Anstataŭante la kasistinon malhelpatan, S.ro Cortvriendt komunikas la financon rezultatan de la Brusela kongreso, kiu postlasis profiton el kiu la duono iros al la kaso de la Ligo.

Punkto 3, pri la ekzamenoj A kaj B estas prokrastita, ĉar la proponinto ne ĉeestas la kunsidon.

Ankaŭ mankas S.ro Lenaers, raportanto por la punkto 4. La sekretario insistas por vigla propagando en la gazetaro kaj bedaŭras ke kiam S.ro Calloens ĉesis la redaktadon de la Esperanta rubriko en « Toerisme », neniu estis trovebla por transpreni la taskon. Tiu propagando tamen estis tre efika ĉar el la rangoj de la Flandra Turista Asocio (V.T.B.) venis multaj novaj samideanoj. Post nova alvoko de la sekretario, S.ro Rainson deklaras ke li zorgos por baldaŭa reapero de tiu rubriko.

Punkto 5, propono de S.ro Telling pri Tutnederlanda Esperanto Ligo. En Bruselo, pro konstato de la emo de F. L. E. aliĝi al la internacia movado, S.ro Telling, dum la Liga kunveno en la urbdomo, subite ĵetis la proponon por kunlabori al TEL. Reveninte en Nederlando, li submetis la proponon al la estraro de Tutnederlanda Esperanto Ligo, kiu delegis al Belgujo komisionon por esplori la situacion ; tial ĉeestas nun la kunsidon F.ino Simonis, S.oj Schmidt kaj Telling.

S.ro Telling diras ke en Nederlando ekzistas precize sama situacio kiel en Belgujo ; « nacia » societo kun 1.200 membroj aliĝas al U. E. A., dum federacio konsistanta el katolikaj, protestantoj kaj neŭtraluloj, kun 2.500 membroj, ne povas aliĝi.

S.ro Telling aldonas ke la flandroj ne devas decidi hodiaŭ pri lia propono ; la afero kresku malrapide ; ni ŝatas ludi honestan ludon ; ni ŝatas ke la membroj de F. L. E. estu komplete informataj, ke ĉiuj membroj sciu bone kiu estas la vojo al vere internacia organizacio.

Laŭ la opinio de S.ro Telling, ni povus konstrui, se ni volus, pli bonan organizon ol U. E. A., sed prefere ni agu kun U. E. A.. T. E. L. ne deziras perforte gajni la flandrajn samideanojn, sed preferas ke ili studu la aferon kaj elektu kelkajn personojn por konsideri la aferon el diversaj flankoj kaj ekzameni la argumentojn.

La sekretario de F. L. E. respondas al S.ro Telling ke ne ekzistas grado de komparo inter la nederlanda kaj belga situacioj. En Belgando vivas du diferencaj popoloj de aparta raso kaj kulturo. Flandra Ligo Esperantista estiĝis en la kadro de la ĝenerala rekonsciiĝo de la flandra popolo. La duecon de la lando sankciis la leĝoj ; la oficiala regulo estas la flandra lingvo en Flandrujo kaj la franca en Valonujo; la armejo, la administracio, la universitatoj, en ĉio el la publika vivo ekzistas divido. Esperanto devis adaptiĝi al la ĝenerale akceptita situacio.

F. L. E. longdaŭre klopodis akiri akcepton de U. E. A. La obstina rifuzo de tiu asocio finfine kreis inter la membroj de F. L. E. indiferencon rilate U. E. A. Nur pro postulo de S.ro Calloens estis farita nova provo por eniri la Universalan Esperanto Asocion ; S.ro Calloens nun ekzistas kiel prezidanto kaj kun li verŝajne estas hakita la lasta fadeno kiu ŝnuras nin ankoraŭ al U. E. A.

S.ro Telling diras ke tiuj klarigoj multe helpas la nederlandan delegitaron en ĝiaj traktadoj, kaj ripetas ke se U. E. A. ne deziras nin, ni mem konstrui domon en kiu ni povas vivi, ni ne timu, la rajto estas je nia flanko.

S.ro Lodema opinias ke en Nederlando temas pri organizaj problemoj inter T.E.L. kaj L.E.E.N., en kiuj F.L.E. ne devas preni pozicion.

F.L.E. estas tro ofte konsidetara kiel ne-neŭtrala ligo, ĉar ĝi akceptas katolikajn kaj laboristajn grupojn.

Aliĝo al Federacio pli forta ol ni, certe utilis al nia situacio.

Al demando de S.ro Lodema, S.oj Telling kaj Schmidt respondas ke T. E. L. ne havas apartajn membrojn; aliĝas nur organizaĵoj, kiuj pagas kotizon provizore fiksitajn je 25 Gld. La societoj restas memstaraj kaj nur kunlaboras por atingi internacian organizon.

La kunsido aprobas starigon de provizora komitato, konsistanta el 2 estraranoj kaj 2 membroj, kiu raportos dum la venonta Liga kunveno pri la opinio de la membroj koncerne tiun aferon.

Post alvoko ke la ĉeestantoj proponu kandidatojn, la estraro estas jene elektita : H. Rainson, prezidanto ; J. Van den Dooren, vicprezidanto ; G. Debrouwere, sekretario.

La sekretario laŭtlegas leteron subskribitan de pluraj samideanoj el Gent, por inviti la 7-an Flandran Kongreson al ilia urbo. La kunsido aplaŭde akceptas la inviton.

S.ro Lodema deklaras ke dum la malsano de S.ro Karnas, li helpis al la kompilado de F. E. Post la morto de S.ro Karnas, li konsentis provizore transpreni la taskon de la ĉefredaktoro ; nun venis la momento ke li deziras transdoni la taskon al pli kompetenta persono. La ĉeestantoj protestas, ĉar sub lia gvido F. E. donis plenan kontentecon, sed S.ro Lodema asertas ke lia sano postulas ĉeson de la laboro kaj ke definitive li ekzistos post apero de la decembra numero.

La sekretario insistas por ke la redakcio de la bulteno restu en Antverpeno, la urbo en kiu F. E. vidis la lumon ; inter la granda nombro da Antverpenaj samideanoj tute certe restas multaj personoj kapablaj prizorgi la eldonon.

S.ro Lodema promesas kunlaboron al kiu ajn redaktoro.

Post iom da atendo, leviĝas S.ro C. Schroeyers dirante je nomo de Flandrema Grupo Esperantista : « ni solvos la aferon ». Sekve de nun tiu grupo havas la honortaskon certigi la aperon de F. E.

La sekretario alvokas la grupojn ke ili konsideru kiel plej grava taskon nunmomentan la varbadon de novaj abonantoj. Pro la inflacio treege plialtiĝis la preskostoj de la bulteno, tiel ke defcito estas antaŭvidata. Nepre necesas gajni 200 novajn membrojn ; per la helpo de ĉiuj ni havos ilin.

La venonta kunveno okazos en Gent, la 8-an de decembro 1935.

Je la 13-a la prezidanto deklaras fermita la kunsidon.

LA SEKRETARIO.

La Inaŭguro de la Esperanta Monumento sur la Tombo de Juul Karnas

Dimanĉon la 22an de septembro, post la ĝenerala kunsido de F. L. E., kolektiĝis la kunsidintoj kune kun multaj samideanoj, amikoj kaj geparencoj ĉe la enirejo de la Berchem'a enterigejo. Proksimume je la 15a horo la sekvantaro marŝadis al la tomo de nia formortinta amiko, malantaŭ la grupstandoj de la grupoj « La Rekta Vojo » kaj « Flandrema Grupo Esperantista ». Krom la vidvino, samideanino Karnas-Verhoeven, la fileto Hendrik, la patro, S.ro Karnas sr. kaj la ceteraj parencoj, ĉeestis amaso da Esperantistoj, inter kiuj ni rimarkis delegitaron de A.P.P.K. gvidatan de S.ro Jan Jacobs ; S.ron M. Jaumotte, direktoron de « Belga Esperantisto » ; S.ron M. de Ketelaere, ĉefdelegiton de U.E.A. ; S.ron J. Telling, reprezentanton de T.E.L. (Nederlando) ; S.rojn H. Rainson kaj G. Debrouwere, prezidanton kaj sekretario de F.L.E. kaj multajn membrojn de preskaŭ ĉiuj grupoj aliĝintaj al F.L.E.

La amaso grupiĝis ĉirkaŭ la monumento kaŝita de granda Esp. flago. S.ro A. Lodema, redaktoro de « Flandra Esperantisto », en la nomo de la Komitato, alparolis la geparencojn kaj samideanojn flandralingve.

Li rememorigis la tagon de la enterigo, la decidon starigi monumenton. Li skizis la laboron de la Komitato kaj pruvis, ke tiu monumento estas donaco de la flandra esperantistaro. Li laŭdis la laboron de la Komitato kaj esprimis sian varman dankon pro la multnombraj ĉeestantoj, precipe al tiuj samideanoj kiuj iam kunlaboris kun Juul Karnas sur alia verda kampo.

En la nomo de la Komitato li transdonis la monumenton al la vidvino.

S.ro A. Meire, la sekretario de la Komitato, forigis la flagon kaj la monumento videbliĝis.

Poste S.ro Lodema daŭrigis Esperantlingve :

« Esperantisto ĝismorte fidela ». Ĉu estas necese ke ni defendu la elekton de tiuj-ĉi vortoj sur la tomoŝtono ? Ĉu nia JUUL ne estis mortanta, kiam li vojaĝis Svisujon kaj de tie gvidis sian grupeton kaj provizis Fl. Esp. per belaj poemetoj kaj priskriboj ? Ĉu li ne estis mortanta irante la duan fojon al Svisujo ? Kaj tamen li prenis sur sin la taskon de redaktoro de Fl. Esp. kun la optimismo, kiu karakterizas tiujn, kiuj suferas je tiu kruela malsanado, kiu lin trenis




Foto « René »

al ta tombo ! Eĉ en la funebra numero aperis ankoraŭ frukton el lia plumo kaj ankaŭ poste, kaj eble estonte la gelegantoj trovos artikolojn de li verkitajn.

Ne nur li estis Esperantisto ĝismorte fidela, sed eĉ postmorte fidela ».

Poste S.ro H. Rainson, nove elektita prezidanto de F. L. E. parolis pri la meritoj de la mortinto, kiel Esperantisto, grupgvidanto, instruisto, kunlaboranto kaj redaktoro. Li memorigis la fakton ke Juul Karnas estis la prezidanto de la unua Kongreso de Flandraj Esperantistoj en Antwerpen en la jaro 1930 kaj instigis ĉiujn flandrajn Esperantistojn labori por Esp. laŭ la ekzemplo donita de la mortinto.

Post tiu-ĉi parolado, la spaco sur la tombo, antaŭ la memortabulo estis tute kovrita per belaj florbukedoj. La surtomba tero malaperis sub la floroj alportitaj de la parencaro, la Komitato, la F. L. E., la Fl. Esp., la Antwerpenaj grupoj kaj de multaj aliaj.

La patro, S.ro Karnas Sr, kortuŝite dankis Esperantlingve la ko-

mitaton kaj ĉiujn samideanojn pro la starigo de la bela monumento, inda al la mortinto kaj Esperanto.

La solenaĵo finiĝis. Ĉiuj kliniĝis antaŭ la tombo, kiel lasta saluto kaj malrapide oni foriris de la kampo de la mortintoj.

De ĉiuj flankoj oni certigis al ni ke la monumento estas tre bela kaj per tri vortoj esprimas la Esperantistan vivon de Juul Karnas.

Ni ne povas fini ĉi-tiun priskribon de la solenaĵo ne espriminte la koran dankon nome de ĉiuj flandraj Esperantistoj al F.ino L. Joukes, prezidantino, S.ro A. Meire, sekretario, S.ro H. Vandermast kasisto kaj S.ro H. Van Durme, membro, pro ilia firma laboro, kiun ni sekvis dekomence ĝisfine.

A. L.

Grafmonument Juul Karnas

INKOMSTEN :

Geldhomhalingen, geldzendingen van groepen en individueelen	fr.	1.613,20
Verkoop 105 exemplaren « Kantaro Esperantista »	fr.	439,30
Totaal	fr.	2.052,50

UITGAVEN :

Postzegels	fr.	32,90
Monument	fr.	1.758,—
Bloemen	fr.	190,—
Cliché	fr.	60,—
Kleine uitgaven	fr.	11,60
Totaal	fr.	2.052,50

De Schatbewaarder,

H. VAN DER MAST.

7a Flandra Kongreso - Gent

30an kaj 31an de Majo kaj 1an de Junio 1936

Ĉiujn mensendojn oni bonvolu fari je P. Ĉ. 1530.50 je nomo de : Ach. De Martelaere. Proveniersterstraat, 25, GENT.

Oni sendu ĉiujn korespondaĵojn por la organiza komitato al la adreso : Raapstraat, 82, GENT.

Unuaj Komunikoj

Kun plezuro kaj danko la organiza komitato jam ricevas enskribojn je 12 fr.oj.

Kiel eble plej baldaŭ ĝi konigos la provizoran programon kaj dissendigos la aligilojn kun ĉiuj prezoj.

Premioj estos donacataj al :

1e — la grupo kiu enskribigos la plej grandan nombron da kongresanoj (ĉiuj enskriboj estas kunkalkulataj — do ne atendu por vin enskribigi ; — ekzemple : el Kortrijk jam unu persono enskribigis sin, ĝi estos kunkalkulota kun la aliaj de tiu grupo).

2e — la eksterlanda karavano kun la plej granda nombro da partoprenantoj.

Glumarkoj dukoloraj baldaŭ estos pretaj. Ni liveros ilin je kiel eble plej malalta prezo.

L. K. K.

Gent

(*Laŭ propagandilo de la « Inlichtingskantor » Halle Belfort*)

Por kompreni la originon kaj la eksterordinaren disvolvigon de la Flandra Pentrarto, oni devas esti vidinta belegan Flandrujon, kie la dezirego je brilaj koloroj kaj belaj modeloj ĉiutempe agitis la animon de la artistoj.


Se la fremdulo konas la grandajn pentristojn pere de iliaj verkoj, kiujn ili havas en siaj muzeoj, nur sur la loko mem li povas fari al si ideon pri la Flandra Konstruarto, eleganta en ĝiaj linioj, proporcia en ĝiaj partoj, kolorriĉa en ĝiaj materialoj. Oni estas mirigata de tia granda riceco, kaj tia diverseco samtempe. Nenie io simila estas videbla. Estas ĉiam la sama Flandra animo kaj tamen ĉiam io alia. Nenia pli impresiga atesto pri tio ol Gent kaj Brugge. « Estas malmultaj urboj en Eŭropo, kiuj tiel similas unu la alian, kaj kiuj ĉerpas ĉe la sama origino, kaj kiuj tamen pli diferencigas ol Gent kaj Brugge. Nenia fremdulo ekhavis pli diversan impreson, ol kiam li vizitis la unu aŭ la alian urbon unufoje ». Tiel skribis la franco Henri Havard. Estus do malĝuste kredi ke oni havas sufiĉan ideon pri Flandrujo, vizitante Brugge, ne vidinte Gent. La monumentoj de Gent, kiel tiuj de Brugge, ĉiuj havas la rekonilon de la Flandra arto; estas same belaj kaj similas tamen malmulte unu la aliajn. Iliaj preĝejoj, urbdomoj, belfridoj, hospitaloj, sinjoraj domoj kaj burĝaj loĝejoj diferencigas en sia ĉirkaŭaĵo en sia ornamaĵo, en siaj materialoj.

Gent, nutrita de sia industrio, ne ĉesis sin plivastigi kaj starigi monumentojn, kiuj havas la postsignon de la bona gusto de siaj arkitektistoj. Ne nur la Romana, la Gotika kaj la Renesanca epokoj tie produktis tipajn monumentojn, sed ankaŭ la Francaj stiloj, modaj dum la XVIIIa jarcento, troviĝas en centoj da domoj, aliformitaj laŭ flandra spirito, de vere talenthavaj masonistoj, ĉarpentistoj kaj ŝtonhakistoj.

De la Romana epoko, antaŭ la XIIIa jarcento, Gent havas: la Grafan Kastelon, la « Spyker » (grenejo) kaj la Sankta-Bavo-abatejon; de la Frua-Gotiko: la malsanulejon, la Kastelon de Gerardo la Diablo, (kun ĝia impona kelo) la Grandan kaj la Malgrandan Falĉilon, la Belfridon; — de la Meza Gotiko (XIVa-XVa jarcento): la abatejon de la « Byloke », la Halojn, la « Rabot », la Vianddomon, la domon de la Tanistoj, la Malantaŭan-Falĉilon; de la Malfrua-Gotiko (XV-XVIa jarcento): la Urbdomon de la « Keure », la Domon de la liberaj ŝipistoj, la Kruĉondirejon de la S.ta Petro-abatejo, la Domon de la Masonistoj, la Kortegon de S.ta Georgo, la Blankan kaj la Nigran Nigrulon; — de ĉiuj specoj de la Renesanco (XVIa-XVIIa jarcento): la Urbdomon de « Gedelee », la Dipatrin-preĝejon de Sankta Petro, la preĝejojn de la Granda- kaj de la Malgranda Beginejo, kaj tiun de la Fulistoj, la Domon de la Grenmezuristoj, kaj centojn da burĝaj domoj. En ĉiuj stratoj oni admiras belajn fasadojn en gracia « Stilo Louis XIV », kun mallargaj interfenestraj muroj, altaj fenestroj kaj tipaj mansardaj tegmentoj. Ili alternas kun fasadoj « Stilo Louis XV » kun kurbaj frontonoj

kaj torditaj ornamaĵoj, — kaj « Stilo Louis XVI » rekonebla je la kolonoj kaj pilastroj en tipaj « Mezzaninoj ». Eĉ la Imperia stilo estas reprezentata en Gent en grandaj fasadoj, malvarmaj kaj rigidaj, kun palmfolioj, mumioj kaj sfinksoj transportitaj el Egiptujo.

La grandaj preĝejoj Sankta Bavo, S.ta Nikolao, S.ta Miĥaelo, preskaŭ ĉiuj komencitaj en la Romana epoko, de arkitektoj, kiuj konceptis ilin tro grandegaj, nur finkonstruigis en la XVa jarcento, tiel ke ili surhavas la rekonilon de la epokoj tra kiuj trapasis la



MALANTAŬA-FALĈILO : gotika tureto de malnova nobela loĝejo : la Granda Falĉilo (apude troviĝas la Malgranda Falĉilo). Ambaŭ domegoj apartenis al familio kiu, laŭ sia nomo, havis falĉilojn en sia blazono.

konstruo. En la meblaro, eksterordinare riĉa en Sankta Bavo, su-
perregas la Renesanco.

Se Brugge havas Gotikajn maŭzoleojn, Gent povas fieri pri siaj
multaj pompaj tomboj de la Renesanca epoko, ĉefverkoj de la plej
bonaj flandraj skulptistoj.

Se Brugge havas sian Memlinc, Gent havas sian Van Eyck.
Brugge montras al vi sian Vendejon kaj sian Fortikajon, sian « Min-
newater » kaj kajojn. Gent pompas pri sia Farailde placo (Veer-
leplaats) sia Monumento- vico, sia Herbkajo (Graslei) kaj sia For-
tikajostrato (Burgstraat). El ĉiaj vidpunktoj Gent kaj Brugge dife-
renciĝas kaj tamen reciproke kompletigas. En ĝiaj muzeoj oni ek-
konas la pentristojn de Brugge. Tiel ankaŭ en Gent, kie plie estas
videbla riĉa aro da nuntempaj verkoj el ĉiaj skoloj. En « Gruut-
huse » en Brugge, oni trovas memorajojn de la malnovaj korporacioj
kaj gildoj, ekzemplojn de lokaj meblaroj kaj riĉan aron da punktoj.
En la « Byloke » en Gent, oni montras al vi belegan konstruajn,
salonegojn kaj ĉambrojn tiajn, kiaj ili estis en praaj jarcentoj, uni-
kan aron da korporaciaj torĉoj, kaj standardoj, kaj riĉan diversecon
da artforĝaĵoj, kiajn oni nenie havas en Belgujo.

Tial fremdulo neniam havus kompletan ideon pri la ekonomia
kaj arta vivo de Malnova Flandrujo, se li ne vizitus unu el ambaŭ
urboj.


Ekster tiuj riĉaĵoj, Gent posedas unikaĵojn : du Beginejojn, kie
en domoj kaj domegoj loĝas centoj da virinoj en mezepokaj vesta-
ĵoj ; — Muzeon de Ŝtonaĵoj kun la plej riĉa aro da gravuritaĵoj kaj
mozaikplankoj el la mezepoko. (S.ta Bavo abatejo) ; —
Muzeon de Industri- kaj ornamarto, en domo « Louis XV », kies sa-
lonegoj, ĉambroj kaj interirejoj rondestas ĉirkaŭ meza korto tute
en la sama stilo. Gent havas ankaŭ Folkloran muzeon, kun jam
riĉaj kolektoj, en la estinta preĝejo de la Ŝuitaj Karmelitoj.

Gent, kun loĝantaro 221.220 nombra, enkluzive la antaŭurboj,
estas la dua Belgia haveno. Ĝiaj haveninstalajoj ampleksas longecon
da 15 KM. La basenoj havas akvosurfacon da 200 HA. kun profun-
decon de 6.50 M. ĝis 8.75 M. La kajoj havas longecon de 11 KM. kaj
estas provizitaj de 125 levmaŝinoj de 2.5 ĝis 25 tunoj.

La bela markanalo de Terneuzen estas 100 m. larĝa kaj 8.75 m.
profunda kaj kunligas la havenon kun la Norda Maro. En 1929 la
havenon envenis 2.882 boatoj kun neto 2.934.449 Moorsom tunoj. —
La ĝenerala transporto en 1930 (importo kaj eksporto) sumiĝis ĝis
9.939.967 tunoj. Ĝi superas tiun de Bremen, (dua Germana haveno)
de Genova (unua Itala) kaj ankaŭ tiujn de Marseille, le Havre, Dun-
kerque, kaj ĉiujn aliajn francajn havenojn, escepte Rouan.

Gent estas la urbo de la Floroj. Tie estiĝis la ĝardenkulturo. Miloj
da kulturejoj en la ĉirkaŭaĵoj havigas ornamaĵajn kreskaĵojn al la
tuta mondo. En Gent okazas la famaj « Floralioj », kvinjaraj kres-
kaĵ- kaj florekspozicioj, kiuj allogas amasojn da vizitantoj el ĉiuj
landoj. Estas veraj sorĉaĵoj, kiuj plenigas la grandan Festpalacon.
En 1933, je la centjara ekzisto de la Floralioj, estis ekspozicio, kiu
superis ĉiujn antaŭajn. La sekvonta okazos en 1938.

Gent estas bonega centro por ekskursoj. De el ĝi oni facile vizitas Aalst, Dendermonde, Ninove, Oudenaarde, Sint Niklaas, k.t.pl. — la kastelojn de Laarne, de Hooionk, de Poeke ; — la Flandrajn Ardenojn ; — la bordojn de la « Leie » (Afsnee, Sint Maartens Laathem, Deurle) kaj tiujn de la « Schelde » (Rupelmonde), Temsche, k.t.pl.).



Gent. — Belega vico da Gotikaj Konstruaĵoj, vidataj de sur la Ponto S.ta Miĥaelo.

Flandra Rakonto

IMPERIESTRO KARLO KAJ LA ABATEJO SEN ŽORGOJ

Rondvojaĝo de imperiestro Karlo en Flandrujo, iutage kondukis lian moŝton al abatejo kies unika pordeto montris la surskribon : « Ĉi-tie oni vivas sen zorgoj ».

— « Ĉu eble », pensis la regnestro, kiu apenaŭ kredis siajn okulojn, « Ĉu ekzistas iu sur la tero kiu scipovas vivi tute senzorge ? Mi ĉiutage devas cerbumadi, senzorga mia kapo neniam estas kaj, en jena abatejo, la vivo estus sen ia nubeto ? Ekstera ŝajno, mensoga allogilo » li konkludis.

Direktinte siajn paŝojn al vilaĝa gastejo, li vokigis la abaton, kiu tute konfuzite aperis antaŭ la altranga vojaĝanto. La imperiestro esprimis sian miron kaj postulis klarigojn pri la senzorga vivo en la abatejo.

La abato tute trankviliĝis kiam li eksciis la kaŭzon de la imperiestra scivolemo, kaj, kun serena vizaĝo, li ridetante respondis : « Imperiestra moŝto, pli simpla afero ja ne ekzistas : ni manĝas, trinkas kaj dormas, kaj pri la cetero zorgas la Sinjoro ».

— « Nu, estimata abato, tio ne plu povas daŭrigi tiel, kaj, por ke vi ankaŭ foje havu zorgojn, mi postulas de vi respondon al jenaj tri demandoj. Unue : kiom profunda estas la maro? — Due : kiom da bovinvestoj oni bezonas por mezuri la distancon de via abatejo al la suno? — Trie : Kion mi opinias? — Morgaŭ je tagmezo mi ĉi-tie atendos viajn respondojn. »

Kun sulkoplena frunto, malgaja mieno kaj klinita kapo la abato malrapide paŝis al la abatejo. For estis lia senzorgeco, ĉar, ju pli li klopodis trovi la respondojn, despli li konvinkiĝis ke li neniam sukcesos solvi tiujn problemojn. Finfine li decidis peti konsilion al la muelisto, kiu estis konata kiel tre ruza viro.

— « Ĉu pro tiaj bagatelajoj vi maltrankviliĝas? » kompatis la muelisto. « Mi ordigos tiun aferon kun Kaĉjo! » Kaj la postan tagon li surmetis la abatan robon kaj tiel alivestite li aperis antaŭ la potenca regnestro.

— « Nu, kara abato, ĉu vi trovis la respondojn? » severmiene lin alparolis la imperiestro.

— « Jes, certe via moŝto. »

— « Mi aŭskultas. »

— « Via imperiestra moŝto, la maro estas unu ŝtonjeto profunda. Por mezuri la distancon de mia abatejo al la suno oni nur bezonas unu bovinveston, kondiĉe ke ĝi estus sufiĉe longa. Kaj vi opinias ke antaŭ vi staras la abaton, sed estas la muelisto. »

Aŭdinte tiujn spritajn respondojn la imperiestro tutkore ekridegis kaj ... se li ne ĉesis, li ankoraŭ ridegas nuntempe.

Rerakontis : E. CORTVRIENDT.



Helpu la Lokan Kongres Komitaton en Gent per frua aliĝo !

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

DE NIEUWE MIDDELEEUWEN van Nikolaas Berdjajew.

Het laatste boek der internationale serie « Die Poorte » is vooral voor ons esperantisten van groot belang, omdat wij er veel lessen en leuzen kunnen uithalen. Het is een profetie over de toekomst van de nieuwe wereldorde die zal geboren worden uit de warboel van de naoorlogse periode. Een machtig, krancig werk en alhoewel wij niet altijd kunnen akkoord gaan met den schrijver, bijvoorbeeld waar hij zegt : « de natie bezit ware bestaansgronden, *het internationalisme niet* », moeten wij erkennen dat zijn profetie, die van 1923 dateert, reeds gedeeltelijk werkelijkheid werd, terwijl nog veel te doen blijft om tot de ideale herinrichting van het sociaal en politiek leven te komen, zooals hij ze geschetst heeft. Ook voor ons Vlamingen is het van belang dezen gedachtengang van een groot denker te volgen en er wellicht onze strijdmethodes aan te toetsen. Als Esperantist kunnen wij zijn solidarisme, hij noemt het « universalisme », goedkeuren, terwijl wij in de toekomst hem misschien ook zullen gelijk geven dat de democratie met haar parlementaire afgevaardigden niet de beste oplossing was, doch liever een sterke macht gesteund op samenwerking van de verschillende standen, vereenigd volgens hun materiele en geestelijke belangen.

DE ROOVERS VAN HET LIANG SCHAN MOER, door Schi Nai An.

Nummer 1 van de nieuwe reeks « Die Poorte » is een vrachtwerk, dat dagen lang in u blijft nawerken. Men leert er een volk, het Chineesche, kennen als humoristisch, als fatalistisch en slachtoffer van de administratie en legeroversten. Het doet eigenaardig aan die bandieten, waaronder geleerden, kapiteins, studenten, priesters, te hooren zeggen dat de Voorzienigheid met hen was, als een rooftocht goed lukte, en toch lezen we in spanning voort met kloppend hart, opdat hun opzet toch moge gelukkig uitgevallen zijn.

Door Esperanto kenden we reeds Japan en zijn letterkunde. China was ons nog minder bekend. Hier biedt Die Poorte ons een schitterende en goedkope gelegenheid om met een der meesterwerken der Chineesche letterkunde kennis te maken. Het prachtig uitgegeven boek, 300 bladzijden lang, kost slechts 10 frank, in de serie genomen. Inlichtingen verschaft L. Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.

Fotoj de la Tombomonumento de J. Karnas estas haveblaj ĉe : « Foto René », Eliaertstraat, 27, Borgerhout.

Prezo : 2 fr., inkluzive sendkostojn.

Radio

En la bulteno de « Radio Club Esperantiste de France », ni legas ke S-ro Jungfer, el Lübben, Germanujo, ne plu prizorgas la internacian radio-servon kaj ke tiu klubo transprenis la taskon.

* * *

« Radio PTT Nord » en Lille, funkcias per sia 60 kw. potenca stacio kaj ĝi estas aŭdebla de Marokujo ĝis Svedujo, de Polujo ĝis Irlando. Sendu esperantlingve viajn aŭskultrezultatojn pri la nova stacio kaj dankojn pro ĉiudimanĉa esperantista duonhoru, kiu okazas je 9a30-10a, al Radio PTT Nord, 36, Boulevard de la Liberté, à Lille.

Eble baldaŭ Lille anoncos esperantlingve siajn programojn.

* * *

La 6-an de novembro, 21.15-22.15, elsendos Brno, Praha I (Librice) kaj Mor. Ostrava en Esperanto horeto, la utopian dramon de Karel Capek : R. U. R. (Rossums Universal Robots).

La 30-an de novembro, 21.15-21.30, 2-a parolado el la ciklo « Ĉekoslovakio laboranta », Dr Z. Wirth, sekcia ĉefo de Ministerio por instruaferejoj kaj nacia kulturo : La Arto.

Aranĝu komunan aŭskultadon kaj nepre subtenu kaj subtenigu la Esperanto-elsendojn el Brno., (adreso : Radiojournal Brno. Ĉekoslovakio).

* * *

Radio Kortrijk daŭre elsendas ĉiudimanĉe, je la 9-a, Esperantistan kronikon. Lasttempe alvenis ĉe la stacio kelkaj gratuletetoj, inter kiuj unu el Halluin, kiuj tre favore impresis la direkcion.

Grupa Vivo

AALST. — PIONIRO.

La fervoraj membroj de « Pioniro » regule kunvenas ĉiun merkredon. La kurso por komencantoj komenciĝos la 3an de novembro je la 10 1/2 matene en la urblernejo, Nieuwbeekstraat.

De post la 6a de novembro okazos ĉiun merkredon, perfektiga kurso por la membroj de nia grupo.

ANTVERPENŬ — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La somero pasis kaj la tempo por la ekskursoj kaj libertempo nun estas for kaj la vintra sezono alportis al ni denove multan gruplaboron. La unua punkto de nia tagordo estis « La grupstatutoj ».

Antaŭ longe nia grupo pruntedonis sian statutaron al alia esperantgrupo por ebligi al ĝi redakcii ĝiajn statutojn en la sama senco kiel la niaj, sed tiu grupo estis tiel afabla neniam resendi ilin. Ĉar

estas do jam pli ol du jaroj ke nia grupo estas sen statutoj, la estraro fine decidis rebonigi al tiu manko kaj redaktis novajn en la sama senco kiel la antaŭaj. Post longaj kaj fortaj diskutoj kaj bonaj konsiloj de niaj advokatoj Mortelmans kaj Verheyden, la ĉeestantoj de la ĝenerala kunveno aprobis la diversajn punktojn de la statutaro. La debatoj daŭris du vesperojn de la 8a ĝis noktmezo. Do bona konsilo por la aliaj grupoj : redaktu novajn statutojn : vi havos bonan kaj interesan esperantvesperon.

Nia somera kurso finiĝis kaj jam la 17an de oktobro okazos nova, en la ejo Malpertuus je demando de la Vl. Nat. Godsvredejeugd-verbond.

La kurso estos gvidata de nia vicprezidanto Rik Van Durme.

La sekretario prizorgis la necesan propagandon en diversaj Antverpenaj ĵurnaloj.

La 5an de oktobro vespere, delegitoj el nia grupo havis specialan kunvenon en la Grand Hotel kun niaj nederlandaj samideanoj S.roj Telling kaj Schmidt el Rotterdam. Ĉefe la esperanta propagando en Antverpeno estis preparolita kaj niaj nederlandaj samideanoj donis al ni tre interesajn kaj praktikajn informojn kiuj havas nian plenan atenton kaj enstudon. Ankaŭ la eventuala starigo de nova tutmonda asocio, al kiu povus aliĝi ĉiu landa aŭ minoritana ligo, al kiu ajn raso aŭ religio ĝi apartenus, estis preparolita. Nia grupo montras sin tre favora al tiu propono kaj esperas ke tiu propono estos bone pristudata en la ligo (1).

Bedaŭrinde ni ne disponis pri pli da libera tempo por pridiskuti pli bone tiujn-ĉi indikojn ĉar en nia ejo niaj membroj jam atendis senpacience nian revenon por komenci la tradician mitulfeston. Gajega tiu festeto estis, organizita de nia senlaca festdirektoro. La mituloj estis bongustaj kaj la ĉeestantoj bone sin amuzis, precipe dank' al nia amiko Boermans, kaj nur je la 4a matene ni retrovis la vojon hejmen.

Jam de nun ni povas inviti niajn gesamideanojn el la diversaj grupoj por ĉeesti nian Kristnaskfeston, kiu okazos la 25an de decembro en la salono « Kathedraal », Melkmarkt, 25. Nenio estos ŝparata por ke ĝi iĝu ankoraŭ pli brila kaj gaja ol la antaŭaj.

(1) Kial F. G. E. ne invitis la redaktoron de Fl. Esp. ĉeesti tiun kunvenon ? Red.

BRUSSEL — N. E. L. E.

Post la kutima somera vegetado nia grupo denove eniras laborplenan vintron. Nur kelkaj tagoj post novjaro komenciĝas nia ĉiujara kurso. Tiu malfrua komenco ebligas al ni plurmonatan eksterordinaran propagandon. Por tiu kurso ni jam dungis, en kunlaboro kun la grupoj el Mechelen kaj Leuven, eksterlandan Ĉe-instruiston, kiu gvidos kursojn en 6 diversaj lokoj en Flandrujo.

La grupo nun posedas honorprezidanton, nome S.ro Karel Verstraete, kiu honorprezidis nian Bruselan kongreson.

La geanoj estas petataj pli regule ĉeesti niajn semajnajn kunvenojn !

RONSE — LA PACA STELO.

Jen novembro, monato dum kiu nia grupo eklaboras kun tutnova freŝa kuraĝo al la disvastigo de nia kara lingvo.

Du kursoj remalfermiĝos.

Malgraŭ tiuj 2 kursoj, la grupo ne interrompas la grupan vivon, ĉar kantvesperoj, gravaj tradukoj, diversaj pliperfektigaj vesperoj ĉiam okazas.

Granda propagando per flugfolioj kaj afiŝoj anoncas la ĉiujarajn kursojn.

Rilate la grupo mem, la estraro alvokas ĉiujn samideanojn por fari ilian devon, ne per vortoj sed per faktoj kaj agoj, por obteni rezultatojn pozitivajn.

En la nuna monato ankaŭ okazos « vespermanĝon » kiu tradicie sufiĉe bone sukcesos, eĉ sen propagando, strange ĉu ne? Nu, ni kalkulas je granda partoprenantaro kaj antaŭe ni jam elkrias: Je via sano.

Gis proksima monato!

Dankesprimo

S.ino A. Lodema-van Reeden tutkore dankas la gesamideanojn pro la multaj gratuloj kaj bondeziroj, kiujn ŝi ricevis okaze de la 60a datreveno de sia naskiĝo.

Momenton ni ridu

— Karulo, mi bezonas absolute novas kostumon. La najbaroj jam konas ĉiujn miajn vestojn.

— Ĉu ne estus pli profite, se ni transloĝus?

— Johano, kiun el la du fratinoj vi plej amas? Ĉu Anjo aŭ Manjo?

— Tion mi ne kuraĝas diri, alie Anjo koleriĝas.

— Estimataj aŭskultantoj, en Afriko vivas ankoraŭ kelkaj sovaĝaj triboj, kiuj tute ne pagas impostojn.

— Unu el la aŭskultantoj: « Pro kio ili do sovaĝiĝis? »

— Kiajn najbarojn vi havas?

— Ho, mi neniam parolas pri aŭ al miaj najbaroj.

— Cio, kion mi scias pri ili estas, ke ili havas kvin infanojn, kiuj dormas kune en du litstabloj; ke ili havas du katojn; ke li estas 20 jarojn pli maljuna ol ŝi; ke ŝi tri jarojn portas la saman ĉapeleton; ke ili estas elpelataj el la antaŭa loĝejo pro luŝuldo kaj ke ili nomiĝas Jansen. Plu mine scias pri ili... »

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeekse steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenstraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brusseel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », vergadering elke Vrijdag te 20 uur, Hombeekse steenweg, 54.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Kien, dum Pentekosto 1936 ?

Al Gent, al la 7a Kongreso de la
Flandraj Esperantistoj !

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.